# GRAVAJ DATREVENOJ



Antaŭ 80 jaroj naskiĝis en Pochlarm (Danubo) :

OSCAR KOKOSCHKA. — Tiu pentristo, grafisto, teatro-dekoraciisto, estas konsiderata, kiel unu el la « ĉefoj » de impresionismo. Liaj dramoj, liaj portretoj kaj pejzaĝoj, liaj dekoroj pruvas lian multaspektan talenton.



Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Vieno :

FRANZ GRILLPARZER. — La aŭstra poeto komence studis juron, fariĝis ŝtatoficisto, poste direktoro de la financaj administraj arkivoj kaj fine kortega konsilanto. Jam dum sia junaĝo li renkontis sukceson kun siaj teatraĵoj « Safo » kaj « La avino ». « Pri maro kaj karaj ondoj » estas la plej perfekta poezia tragedio. La verkoj de Grillparzer asocias la aŭstran barokon kun romantikaj kaj klasikaj elementoj.



Antaŭ 475 jaroj mortis en Breisach :

MARTIN SCHONGAUER. — Pentristo kaj gravuristo de la malfrua periodo gotika, filo de oraĵisto, li estis instruata en Bruselo. Liaj laborajoj multe influis la tiaman arton kaj Dürer inspiriĝis per ili por siaj kupro-gravuraĵoj.